1. La italaj liroj ne valoras kiel la germanaj markoj. — 2. Ĉu vi scias kion mi volas? Jes, vi volas kajeron. — 3. Apenaŭ li min vidis eniri, li volis ke mi sidiĝu ĉe li. — 4. Kiam ni alvenis sur la foiro, ni vendis nian ĉevalon, kiu ne valoris multe, kvankam antaŭ kelkaj jaroj ĝi valoris pli multe. — 5. Mi volas ke ci venu kun mi al la reĝa pinakoteko. Ci vidos kiom da belegaj pentraĵoj ĝi entenas. — 6. Mi volis aliri la pasintan jaron sed en tiu tago ĝi estis fermita. — 7. Kiu el vi, infanoj, volus iri ĝis mia domo kaj preni por mi mian vojaĝan surtuton? — 8. Mi valoras tre malmulte pri aritmetiko, kiel ci valoras tre malmulte pri desegnarto. — 9. Nia hundo vidante ĉasaĵon furioziĝas.

ITALA KATEDRO DE ESPERANTO

Ni havas la plezuron informi ke la Katedranoj Prof. D-ro Arturo Ghez el Triesto kaj Prof. Aleksandro Mazzolini el Peruĝo estis elektitaj membroj de l' Lingva Komitato. Gratulojn al niaj nelacigeblaj kunfratoj.

Docentoj Kav. De Simonis kaj S-ro Chierago el Triesto, kiuj veturintaj Parizon por la Deko, ne povis aŭ ne volis forlasi Francujon dum la unuaj tagoj de la mobilizado, devis atendi pli ol unu monaton en Le Blanc. Nun ili ricevis la permeson rehejmiĝi dank' al afabla perado de Generalo Seebert, kaj fakte ili povis reveni sian sidejon antaŭ kelkaj tagoj.

Ni sendas simpatian saluton al tiuj unuaj senkulpaj viktimoj de la milito pro ilia amo al Esperanto.

« La Ruĝa Kruco apartenas al tiuj institucioj, kiuj plejmulte bezonas iun facile ellerneblan lingvon ».

D-ro ZAMENHOF

GRAMATIKO DE PORTUGALA LINGVO

IV. LECIONO

SUBSTANTIVO (daŭrigo)

Multenombro.

La portugalaĵoj finiĝas, kiel estis dirite en la antaŭa leciono, per vokalo aŭ per unu el la konsonantoj: *l, m, n, r, s, x, z*.

La karakteriza finiĝo de la multenombro estas la litero **s**.

De la vortoj finiĝantaj per la vokaloj *a, e, i, o, u, y*, oni ricevas la multenombro aldonante la literon **s** al la ununombra formo:

Porta, pordo - *portas* pordoj.

Fonte, fonto - *fontes* fontoj.

Bisturi, bisturio - *bisturis* bisturioj.

Copo, (kópu), glaso - *copos* glasoj.

Tribu, tribo, gento - *tribus* triboj, gentoj.

ESCEPTO — Kiam la nomo finiĝas per la naza diftongo *ão*, ekzistas tri finiĝoj por la multenombro: *ões, ãos, ães*. La finiĝo *ões* estas la plej komuna.

Coração, (korasáu), koro - *corações* (korasóis), koroj.

Opinião, opinio - *opiniões* opinioj.

Mão, mano - *mãos* manoj.

Christão, (kristáu), kristano - *christãos* kristanoj.

Pão, pano - *pães* panoj.

Capitão, kapitano, estro - *capitães* kapitanoj.

Al la nomoj kiuj finiĝas per *al, ol, ul*, oni anstataŭas *l*, per *es*:

General, (ĝeneral), generalo - *generaes* generaloj.

Lençol, (lensól), littuko - *lençoes* littukoj.

Paul, (paúl), marĉo - *paues*, marĉoj.

ESCEPTO — La multenombro de *mal*, malbono - *consul*, konsulo - *real*, reĵso - estas *males, cônsules, réis*.

Al la nomoj finitaj per *el*, oni anstataŭas *l*, per *is*:

Annel (anél), ringo - *anneis* ringoj.

Coronel, (koronél), kolonelo - *coroneis* koloneloj.

La nomoj kiuj finiĝas per *il* estas *agudos* aŭ *graves*, laŭ ke la akcento staras sur la lasta aŭ sur la antaŭlasta silabo.

Al la unuaj, oni anstataŭas *l* per *s*:

Barril, barelo - *barris* bareloj.

Funil, funelo - *funis* funeloj.

Al la duaj (*graves*) oni anstataŭas *il* per *eis* :

Fóssil, fosilio - *fosseis* (fósejs), fosilioj.

Facil, facila - *faceis* (fasejs), facilaj.

Al la nomoj finiĝantaj per *m* oni anstataŭas *m* per *ns* :

Som, sono - *sons* sonoj.

Homem, (omén), homo, viro - *homens* homoj, viroj.

Al la nomoj finiĝantaj per *n*, oni aldonas *s* :

Iman, magneto - *imans* magnetoj.

Joven, (jóven), junulo - *jovens* junuloj.

Al la nomoj finiĝantaj per *r* kaj *z*, oni aldonas *es* :

Flor, floro - *flores* floroj.

Vóz, voço - *vózes* voĉoj.

Cruz, (kruz), kruco - *cruzes* krucoj.

Al la nomoj finiĝantaj per *x*, oni anstataŭas *x* per *ces* :

Calix - kiu havas ankaŭ la formon *calice* (kaljsi), kaliko - *calices* (kalj-sis), kalikoj.

La nomoj kiuj finiĝas per *s* ne ŝanĝiĝas por formi la multenombbron :

Lapis, kraĵono, kraĵonoj.

Alferes, subleŭtenanto, subleŭtenantoj.

Pires, subtasoj, subtasoj.

ESCEPTO — *Deus*, Dio - *Deuses* (deŭzis), Dioj.

Vortoj kunmetitaj

Ordinare, oni metas la difinatan radikon antaŭ la difinantan, male de Esperanto :

Couve-flor (koviflor), florbrasiko.

Banho-maria (banjumaria), maribano.

Meio-dia (mejudia), tagmezo.

Kiam la kunmetitaj vortoj estas formitaj el substantivoj kaj adjektivoj apartigitaj per streketoj, ambaŭ radikoj ricevas la multenombbran fleksion :

Couves-flores, florbrasikoj.

Kiam ili estas formitaj el verbo, prepozicio aŭ adverbo kaj substantivo aŭ adjektivo, nur tiuj lastaj prenas la fleksion :

Entre-acto, (entriatu), interakto - *entre-actos* interaktoj.

Sobrenatural, supernatura - *sobrenaturaes* supernaturaj.

Guarda-chuva, (gŭardaŝuva), pluvombrelo - *guarda-chuvas* pluvombreloj.

Sempreviva, helikrizo - *semprevivas* helikrizoj.

La fleksio multenombra ne alilokas la akcenton de la vortoj.

Estas unika escepto : *character*, (karáter), karaktero, signo, kiu fariĝas *caractères* (karatérís).

Kelkaj substantivoj estas uzataj nur en la multenombro :

Algemas, mankatenoj - *arredores*, ĉirkaŭaĵoj - *andas*, iriloj - *damas*, (ludo), damoj - *fèrias*, libertempo, ripoztempo - *fèzes*, fekoj - *viveres* nutraĵoj k. c.

Dizionario Metodico Italiano-Esperanto
Metoda Vortaro Itala-Esperanta

(daŭrigo)

difetto *difekto*, -aĵo
diffalco *diskonto*
direttamente *senpere*
direttore *direktoro*
diritti doganali *limdepago*,
limimposto
ditta *firmo*
dividendo *dividendo*
documento *dokumento*
dogana *dogano*
— (locale) *doganejo*
— (imposta) *doganimposto*
doks (magazzino del porto)
doko
effetto *bilo*
entrata *enspezo*
esecuzione *plenumo*
esportazione *ekstersendo*,
elporto, *eksporto*
etichetta *ŝuldatesto*, *etiketo*
fabbricante *fabrikanto*, *fabrikisto*
fabbricazione *fabrikado*
facchinaggio *elspezoj por*
la ŝarĝoportistoj
fallimento *bankroto sim-*
pla
— doloso *trompa bank-*
roto
fattura *fakturo*
fiera *foiro*
finanziario *financa*
finanza *financo*
fior di roba *elektita ko-*
mercaĵo
firma *subskribo*
fimatario *subskribinto*
fornitore *liveranto*

Latina Lingvo per Esperanto

V. LECIONO

24.

ADJEKTIVOJ

	Singulare			
	VIRAJ	INAJ	NEŬTRAJ	
Nom.	<i>bön-ŭs</i>	<i>bön-ă</i>	<i>bön-ŭm</i>	bona
Gen.	<i>bön-ĭ</i>	<i>bön-ae</i>	<i>bön-ĭ</i>	
Dat.	<i>bön-ō</i>	<i>bön-ae</i>	<i>bön-ō</i>	
Ak.	<i>bön-ŭm</i>	<i>bön-ăm</i>	<i>bön-ŭm</i>	
Vok.	<i>bön-ě</i>	<i>bön-ă</i>	<i>bön-ŭm</i>	
Abl.	<i>bön-ō</i>	<i>bön-ā</i>	<i>bön-ō</i>	
	Plurale			
Nom.	<i>bön-ĭ</i>	<i>bön-ae</i>	<i>bön-ă</i>	bonaj
Gen.	<i>bön-örŭm</i>	<i>bön-ärŭm</i>	<i>bön-örŭm</i>	
Dat.	<i>bön-ĭs</i>	<i>bön-ĭs</i>	<i>bön-ĭs</i>	
Ak.	<i>bön-ōs</i>	<i>bön-ās</i>	<i>bön-ă</i>	
Vok.	<i>bön-ĭ</i>	<i>bön-ae</i>	<i>bön-ă</i>	
Abl.	<i>bön-ĭs</i>	<i>bön-ĭs</i>	<i>bön-ĭs</i>	
	Singulare			
	VIRAJ	INAJ	NEŬTRAJ	
Nom.	<i>nĭĝer</i>	<i>nĭgr-ă</i>	<i>nĭgr-ŭm</i>	nigra
Gen.	<i>nĭgr-ĭ</i>	<i>nĭgr-ae</i>	<i>nĭgr-ĭ</i>	
Dat.	<i>nĭgr-ō</i>	<i>nĭgr-ae</i>	<i>nĭgr-ō</i>	
Ak.	<i>nĭgr-ŭm</i>	<i>nĭgr-ăm</i>	<i>nĭgr-ŭm</i>	
Vok.	<i>nĭĝer</i>	<i>nĭgr-ă</i>	<i>nĭgr-ŭm</i>	
Abl.	<i>nĭgr-ō</i>	<i>nĭgr-ā</i>	<i>nĭgr-ō</i>	
	Plurale			
Nom.	<i>nĭgr-ĭ</i>	<i>nĭgr-ae</i>	<i>nĭgr-ĭ</i>	nigraj
Gen.	<i>nĭgr-örŭm</i>	<i>nĭgr-ärŭm</i>	<i>nĭgr-örŭm</i>	
Dat.	<i>nĭgr-ĭs</i>	<i>nĭgr-ĭs</i>	<i>nĭgr-ĭs</i>	
Ak.	<i>nĭgr-ōs</i>	<i>nĭgr-ās</i>	<i>nĭgr-ă</i>	
Vok.	<i>nĭgr-ĭ</i>	<i>nĭgr-ae</i>	<i>nĭgr-ă</i>	
Abl.	<i>nĭgr-ĭs</i>	<i>nĭgr-ĭs</i>	<i>nĭgr-ĭs</i>	

25. Laŭ *bonus*, *bona*, *bonum* kaj *niger*, *nigra*, *nigrum* oni deklinacias ankaŭ la sekvantajn adjektivojn:

<i>albus, alba, album</i> blanka	<i>piger, pigra, pigrum</i> mal-	franco di porto <i>afranke,</i>
<i>malus, -a, -um</i> malbona	laborema	<i>afrankite</i>
<i>magnus, -a, -um</i> granda	<i>vafer, vafra, vafrum</i> ruza	franco di spesa <i>senelspeze</i>
<i>altus, -a, -um</i> alta	<i>aeger, aegra, aegrum</i>	galoppino <i>kura knabo</i>
<i>aptus, -a, -um</i> lerta, taŭga	malsana	garante <i>garantianto</i>
<i>caecus, -a, -um</i> blinda	<i>asper, àspera, àsperum</i>	garanzia <i>garantio</i>
<i>fidus, -a, -um</i> fidela	maldolĉa	gerente <i>komerca kondu-</i>
<i>justus, -a, -um</i> justa	<i>miser, mîsera, mîserum</i>	<i>kisto</i>
<i>longus, -a, -um</i> longa	mizera	gerenza <i>administrado</i>
<i>multus, -a, -um</i> multa	<i>noster, nostra, nostrum</i>	giacente in dogana <i>kuŝan-</i>
<i>pius, -a, um</i> pia	nia	<i>ta en doganejo</i>
<i>verus, -a, -um</i> vera	<i>vester, vestra, vestrum</i> via	giornale <i>taglibro</i>
<i>meus, -a, -um</i> mia	<i>prosper, pròspera, prò-</i>	giorno di mercato <i>vende-</i>
<i>tuus, -a -um</i> cia	<i>sperum</i> bonsanca	<i>ja tago</i>
<i>suus, -a, -um</i> lia, ŝia, ĝia,	<i>lacer, làcera, làcerum</i>	giovane di banco <i>junulo,</i>
ilia, ŝia	ĉifona	<i>metia lernanto</i>

26. Unuiĝo de nomoj kun adiektivoj.

<i>donum magnum</i> granda	<i>vinum rubrum</i> ruĝa vino	girobanco <i>girobanko</i>
donaco	<i>aper ferus</i> kruela apro	giroconto <i>girokonto</i>
<i>pulchra laurus</i> bela laŭro	<i>vir probus</i> honesta viro	grande velocità (a) <i>rapid-</i>
<i>poëta clarus</i> klera poeto	<i>âsinus piger</i> mallabore-	<i>ire</i>
<i>populus procera</i> alta po-	ma azeno	gratis <i>senpage</i>
plo	<i>servus vafer</i> ruza servisto	gratuitamente <i>senpage</i>
<i>rosa alba</i> blanka rozo	<i>dolus miser</i> trompo mizera	grossista <i>komercisto po</i>
<i>pèlagus profundum</i> pro-	<i>concivo aeger</i> kunmanĝ-	<i>grande</i>
funda maro.	anto malsana	impiegato <i>oficisto</i>
<i>horreum plenum</i> grenejo	<i>Perses piger</i> persano mal-	impiego <i>ofico</i>
plena	laborema	imponibile (dàzio) <i>impo-</i>
<i>pirata impium</i> malpia ŝte-	<i>Scythes liber</i> libera Scito	<i>stebila</i>
listo		importazione <i>enporto, in-</i>

EKZERCO

1. Ingenia nostri aevi sunt klara.	1. <i>Inĝenja nostri eci sunt klara.</i>	importo <i>sumo, importo</i>
2. Nos laudamus semper nostros propinquos.	2. <i>Nos laŭdamus semper nostros propinkŭos.</i>	indennità <i>kompenso</i>
3. Mortuorum memoria est grata bonis viris.	3. <i>Mortŭorum memoria est grata bonis viris.</i>	indennizzo <i>kompenso</i>
4. Ursus est fera bestia.	4. <i>Ursus est fera bestja.</i>	indirizzo <i>adreso</i>
5. Pili ursorum pulli sunt.	5. <i>Pili ursorum pulli sunt.</i>	industriale <i>industriŭsto</i>
6. Cauda ursi parva est.	6. <i>Kaŭda ursi parva est.</i>	informazioni <i>sciĝoj, infor-</i>
		<i>moj</i>
		ingrosso (all') <i>po grande</i>
		insegna <i>elpendajo</i>
		insolvibile <i>nesolventa</i>
		interesse <i>procento, ren-</i>

tumo
 introduzione *prezento*
 inventario *etato, inventaro,*
inventara libro
 involto *pakaĵo*
 lagno *plendo*
 lettera di cambio *kambio*
 — di presentazione *pre-*
zenta letero
 — d'avviso *avizletero*
 — di condotta, di porto
ŝargastesto, transport-
atesto
 libero di dazio *senimposte*
 libro dei conti *kontolibro*
 — mastro, giornale, *vedi*
 mastro, giornale
 liquidazione *elvendo*
 listino dei prezzi *prezaro*
 locale *ĉi-tiea, loka*
 lordo *bruta pezo, kuntare*
 lotto (di mercanzia) *parto*
 magazzino *tenejo*
 manifattura *manfarado*
 mastro *ĉeflibro, kontolibro*
 mediatore *makleristo*
 medio (di qualità) *meza-*
bona
 mercato *komercejo*
 merce, mercanzia *komer-*
caĵo
 merciaiuolo ambulante *kol-*
portisto, migranta ven-
disto
 mezza qualità (di) *mez-*
kvalita
 minuta *malneto*
 misura *mezuro* (vedi ca-
 pitolo: **misure**)
 mittente *ekspedanto*
 mostra *specimeno, modelo*
 — di stoffa *ŝablono*
 multa per ritardo *pago*

7. Adulti ursi etiam mul-
 tis bestiis periculosi sunt.
 8. Vera amicitia sempiter-
 na est.
 9. Vos pueri estis pigri.
 10. Ludum et jocum et
 somnum amatis.
 11. Coma antiquorum Ger-
 manorum flava erat.
 12. Incolae opulentae Co-
 rinthi luxuriosi et super-
 bi erant.
 13. In eloquentiae studio
 vitam consumpsi.
 14. Judicium probi et ju-
 sti viri odio et gratia
 liberum est.
 15. Sunt pueritiae certa
 studia.
 16. Epirus parva et non
 frugifera erat.
 17. Discordia venenum est
 familiae.
 18. In bonis factis magna
 gloria est, parva in ver-
 bis superbis.
 19. Strenui agricolae ne-
 gotia sua magis amant
 quam otium.
 20. Rhenus multas insulas
 habet.
 21. Ripae amaeni Rheni o-
 pulentis oppidis refertae
 sunt.
 22. Fecunda Aegypti est
 donum Nili.

7. Adulti ursi eĉjam mul-
 tis beŝtiis perikulozi
 sunt.
 8. Vera amiĉicja sempi-
 terna est.
 9. Vos puĉri estis pigri.
 10. Ludum et jokum et
 somnum amatis.
 11. Koma antikŭorum Ger-
 manorum flava erat.
 12. Ĥnkölē opulentē Ko-
 rinti luksuriozi et su-
 perbi erant.
 13. In elokŭencjē studjo
 vitam konsumpsi.
 14. Judiĉjum probi et ju-
 sti viri odjo et gracia
 liberum est.
 15. Sunt puĉricjē ĉerta
 studja.
 16. Epirus parva et non
 frugiĝfera erat.
 17. Diskordja venenum
 est familjē.
 18. In bonis faktis maĝa
 gloriĵa est, parva in
 verbis superbis.
 19. Strenŭi agrikölē ne-
 gocja sua maĝis amant
 kŭam ocjum.
 20. Renus multas insŭlas
 habet.
 21. Ripe amēni Reni o-
 pulentis oppidis refer-
 te sunt.
 22. Fekunda Egipti est
 donum Nili.

Traduko

1. Talentuloj de nia epoko estas kleraj. — 2. Ni
 laŭdas ĉiam niajn parencojn. — 3. Memoro pri mor-
 tintoj estas agrabla al bonaj viroj. — 4. Urso estas
 besto kruela. — 5. Haroj de ursoj estas nigretaj. —
 6. Vosto de urso estas malgranda. — 7. Plenkreskaj

ursoj ankaŭ al multaj bestoj estas danĝeraj. — 8. Vera amikeco estas eterna. — 9. Vi, infanoj, estas mallaboremaj. — 10. Vi amas ludon kaj amuzon kaj dormon. — 11. Hararo de antikvaj germanoj estis klara. — 12. Loĝantoj de riĉega Korinto estis diboĉaj kaj malhumilaj. — 13. En la studado de elokventeco mi eluzis vivon. — 14. Juĝo de honesta kaj justa viro estas libera je malamo kaj favoro. — 15. Estas al infaneco kelkaj okupoj (emoj). — 16. Epiro estis malgranda kaj ne fruktiga. — 17. Malakordo estas veneno de familio. — 18. En bonaj agoj estas granda gloro, malgranda en malhumilaj vortoj. — 19. Fortaj kamparanoj amas pli siajn negocojn ol mallaboron. — 20. Rejno havas multajn insulojn. — 21. La bordoj de ĉarma Rejno estis kovritaj je riĉaj kasteloj. — 22. La fruktemo de Egiptujo estas donaco de Nilo.

II. EKZERCO

1. La poplo estas alta. — 2. La arbaro estas ombra. — 3. Vivo de piaj kamparanoj estas saniga sed peniga. — 4. Jaroj de nia vivo estas ne certaj; la ĝojoj de la ĉielo estas eternaj. — 5. Romo havas multajn konstruaĵojn kaj belajn templojn. — 6. Romanoj amis multe la militon. — 7. Ĉevalo estas bela besto. — 8. Vosto de ĉevalo estas longa. — 9. Azio estas patrujo de ĉevaloj. — 10. Ĉevaloj estas fortaj kaj fidelaj. — 11. Por bonaj viroj patrujo estas ĉiam kara. — 12. Homoj estis fortaj en milito, mallaboremaj dum ripoztempo. — 13. Virinoj estis laboremaj kaj agemaj. — 14. Ludoj de infanoj kaj de knabinoj estis gajaj.

arbaro *silva*
 ombra *umbrosus, -a, -um*
 saniga *salutifer, -a, -um*
 peniga *durus, -a, -um*
 jaro *annus*
 necerta *incertus, -a, -um*
 ĝojo *laetitia*
 havas *habet*
 konstruaĵo *aedificium*
 amis *amabant*
 multe *valde*
 milito *bellum*
 ĉevalo *equus*
 besto *bestia*
 vosto *cauda*

longa *longus, -a, -um*
 patrujo *patria*
 forta *robustus, -a, -um*
 ĉiam *semper*
 karo *carus, -a, -um*
 homo *vir*
 mallaborema *piger, -a, -um*
 dum *en*
 ripoztempo *otium*
 virino *femina*
 agema *sollicitus, -a, -um*
 ludo *ludus*
 infano *puer*
 knabino *puella*

pro malfruiĝo
 negoziante *negocisto*
 negoziare *trakti*
 netto (peso) *neta pezo, sentare*
 noleggiare nave *lui ŝipon*
 nolo *transporta kosto*
 noto *etato, listo*
 nuovi sbocchi *novaj vendejoj*
 obbligazione *obligacio, obligaciaj akcioj*
 occasione *okaza vendo aŭ aceto*
 offerta *propono, prezpropono*
 oltremare (commercio d') *transmara komerco*
 ordinazione *mendo*
 ore d'ufficio *negocaj horoj*
 pacco, pacchetto *pako, pakajo, -eto*
 — postale *poŝtpakajo*
 padrone *estro, ĉefo, mastro*
 padrone dell'azienda *firma posedanto*
 paga *salajro*
 pagabile *pagebla*
 pagamento *pago*
 pagare (da) *pagota*
 parere, avviso *opinio*
 passivo *pasivo, ŝuldaro*
 perdita *malprofito*
 piccola velocità (a) *malrapide*
 polizza di assicurazione *asekura poliso*
 polizza di carico (fakturo) *ŝargatesto*
 portatore *portanto*
 porto *transporto*

PRINTEMPO

(Pejzaĝoj kaj figuraĵoj de la toskana kamparo.) (daŭr. kaj fino)

Kaj sur li falis rigardo kaj eta rideto, kiu igis lin etendi ameme brakon ĉe la kolo de l' plej proksima amiko, kaj kuri tuj en la preĝejon apud la altaro, por peti dum la meso, almenaŭ alian rideton kaj alian rigardon de lia Gioconda, kiu ruĝa kaj konfuza donis al li mil da ili, ne volante doni eĉ unu.

Dio estas pardoninta al Mazo la profanadon, ĉar ankaŭ la plendinda mortinta ĉefpastro ne opiniis ke li faris pekon, kiam turniĝante ĉe la " Dominus vobiscum „ li rigardis la ĉielon, la vizaĝon de Gioconda, kaj reportis siajn senkulpajn okulojn super la mistikan tablon.

Gioconda kaj Mazo povis neniam edziĝi.

Ili amis sin longatempe, ili tre amis sin, ili amis unu la alian eble tro multe! sed la sorto ne volis ilin kunigitaj.

Kiam li revenis post la militista servado daŭrinta dekok jarojn, li trovis ŝin fariĝinta edzino kaj patrino de kvar infanoj.

La balbutulo Roko, kiu donis piedfrapojn al la azeno kaj posedis grasajn bovinojn, estis edziĝinta je ŝi jam antaŭ dekdu jaroj.

De tiu tempo ĝis la morto Roko havis la tutan amemon de sia Gioconda, al Mazo ĉiam restadis la amo.

— Nun estas malfrue! — pensis Mazo levante malrapide la kapon el la faskon de trifolio — estas malfrue! — kaj ekrigardis la vizaĝon de sia Gioconda duondormanta kun la kapo inter la floroj de onobriko, por serĉi en ĝi almenaŭ lastan postsignon de l' iama beleco.

La malglatan lentugan haŭton de tiu kolo li vidis iom post iom refariĝi blanka kaj glata; la mil sulkoj unu post la alia malaperis el tiuj velkaj vangoj, kiuj poste ŝajnis freŝaj kaj plenaj je juna sango; post ilia terkoloro postvenis la rozkoloro; la malmultaj blankaj haroj refariĝis blondaj kaj kunplektitaj en dikaj harligoj, kaj post sesdek jaroj, li revidis ŝin juna kaj bela; kaj li, same rejuniĝinta, reamis ŝin, kiun li ĉiam nomis la pasio de sia animo.

Dume, printempo varme sopiris tra la kamparo forŝtelante parfumojn kaj kantojn al la floroj ekfloritaj je la tagiĝo kaj al la enamiĝintaj paruoj.

Mazo klinis sian vizaĝon al tiu de Gioconda por tie surdoni kison, sed Gioconda, sentinte varman spiron sur sia vango, malfermis la okulojn, divenis la penson de l' maljunulo el la rideto brilanta en liaj malsekaj okuloj kaj, fikse rigardante lin kaj same sidetante, ekdiris: — Kaj nun kion vi havas, maljuna frenezulo? — La maljunulo ne respondis, sed proksimiĝante al ŝia orelo, murmuretis kelkajn vortojn, kiuj kaŭzinte en ili ambaŭ eksplodon da fortaj ridoj, igis ilin refali dorsen inter la florojn de l' herbo por montri al la ridanta ĉielo iliajn bedaŭrindajn larĝajn kaj sendentajn buŝojn.

La vento kaptis tiujn voĉojn, kaj ilin forportante fluge, almetis ankaŭ tiun raŭkan sonon al la misteraj harmonioj de l' kreitaro.

El la " *Veglie di Neri* „ de **Renato Fucini** (ed. Ulrico Hoepli, Milano)
Tradukis *Carlo Simonis*, Trieste.

RICEVITAJ LIBROJ

A. NEDOŠIVIN - *Pri solidareco inter esperantistoj* - Traduko de B. Kotzin el la Raporto farita en rusa lingvo dum la jara kunveno de Kovna Esperantista Societo. Prezo 10 sd.

Leginda bruŝuro 12-paĝa.

"*Karaktero*," laŭ Mr. J. M. Von Stipriaan Luiscius, advokato en Hago. - Tria plivastigita kaj plibonigita eldono, tradukita laŭ la 8.a eldono de l' nederlanda originalo. Hago 1914, Librejo Espero, prezo sm. 0.200 (fr. 0.50).

Tiu ĉi libreto estas absolute inda je plena laŭdo. Ĝi estas la vera kodo de la honesta civitano nuntempa.

"*Gvidfolio tra Padova*," eldonita de la tiea Esperantista Klubo, sub la aŭspicioj de U. E. A. 4 paĝa.

"*Gvidfolio tra Legnago*," de la tiea Esperantista Klubo, sub la aŭspicioj de U. E. A. Tiuj gvidfolioj en malmulta loko enhavas ĉion interesan por la turisto. La grupoj kiuj ilin eldonis meritas plenan laŭdon.

HAJK SRABJAN - *Invito al la internacia lingvo Esperanto* - "Anatolia" Pres, Hagon M. Sirabian, Marsovan.

La bruŝuro estas en lingvo armena kaj Esperanto. Ĝi enhavas diversajn esperantajn literaturaĵojn kun armena traduko, resuman gramatikon por armenoj kaj vortareton esperantan-armenan. La verkisto estas lernanto de nia nelacigebla kunfrato D-ro Arturo Ghez.

TENNYSON - *In memoriam*. Trad. A. E. Styler, eldonita de British Esperanto Association, prezo Sm. 0.750.

La libro entenas 131 kantoj de diversaj longoj. La poemo prikantas la doloron kiu sentis la poeto pro la perdo de sia amiko Arturo Hallan. Ĝi estas la plej alta tributo de amo farita de unu homo al alia.

ESPERANTA KRONIKO ITALUJO

Propagandoj paroladoj faritaj en Provinco Belluno sub la aŭspicioj de la Katedro:

PIEVE DI CADORE, 27 de julio, lernejoj, 45 aŭskultantoj - LOZZO BELLUNESE, 28, Circolo Giovanile, 70 - DONEGGE 29 julio, ĉambro de la komunuma konsilantaro, 50 - CATALALZO, 30, kooperativo, 100 - VALLE DI CADORE, 31, ĉambro de la komunuma konsilantaro, 60. S. VITO DI CADORE, 1 de Aŭgusto, kafejo Marcuzzi, 45 - VODO, 2, lernejoj, 15 - BORCA, 2, lernejoj - TAI (Pieve di Cadore), 5, lernejoj, 80 - VIGO DI CADORE, 9, ĉambro de la komunuma konsilantaro, 60 - LORENZAGO, 9, ĉambro de Hotelo Trieste, 80 - AURONZO, 13, ĉambro de kafejo de la Poŝto, 45 - DOSOLEDO, 15, lernejoj, 50 - PADOLA, 15, lernejoj, 50 - CANDIDE, 15, komunuma palaco, 60 - CAMPOLONGO (S. Stefano di Cadore), 16, lernejoj, 50.

Agordo - Dimanĉon 12.an de julio okazis la solena disdono de la diplomoj al la lernantoj de la rapida kurso farita ĉe la nacia Minlernejo kaj la inaŭguro de la standardo de la loka grupo. La belan paroladon de la Direktoro de la dirita lernejo, dank' al kiu Esperanto estas enradikita en la ĉarma Agordo, ni presas je paĝo 116 de tiu ĉi numero. Post la paroladoj en Itala kaj en Esperanto, oni kantis la himnon kun akompano de gitaro, fluto kaj korneto, farita de S-roj Trankvilo kaj Ferdinando Genisi kaj Andreo Boldini. Fraŭlino Lina De Col, instruistino de La Valle, kaj S-ro Mario Cozzi, docento de la minlernejo, estas jam lertaj esperantistoj kaj espereble malfermos kursojn.

Legnago - Docento S-ro Giovanni Saggiori, Direktoro de la sidejo de Legnago, publikigis tre taŭgajn propagandilojn de Esperanto. Petu specimenojn de la nelacigebla kunfrato.

EKSTERLANDO

Capodistria - Al nia karega kaj lerta samideano Prof-ro Demetrio Cossaro mortis sepmonata infaneto, Ĝuseppina. Niajn kondolencojn.

Un Manuale completo d'Esperanto

è costituito dalla prima annata (1913) del nostro periodico L'ESPERANTO.

Libro altamente interessante, non solo per la grammatica della lingua che in esso è svolta ampiamente, in modo facile e con esercizi ben graduati, ma altresì per i numerosi articoli e la varietà delle rubriche, che mettono in chiara evidenza la grande importanza dell'Esperanto in tutte le manifestazioni dell'arte e del pensiero nei rapporti internazionali tra i popoli.

Esso serve mirabilmente tanto a coloro che desiderano apprendere la lingua anche senza maestro, come a coloro che amano farsi un buon corredo di cognizioni per propagarla mediante conferenze e corsi pubblici.

Il libro è già usato come testo di studio da parecchi Docenti della Cattedra.

Le 24 dispense dell'annata formano un bel volume, legato in brochure, di pagine 192 del formato 24x15.

Una copia L. 1.25. Ai nostri abbonati L. 1. - Sconto per più copie.

L'Esperanto

S. Vito al Tagliamento
(ITALIA)

Un anno L. 2 — Con l'appendice letteraria *Itala Animo* L. 3
Eksterlande: Jare Fr. 3.25 — Kun *Itala Animo* Fr. 4.75

Collezione 1913 L. 1.25 — Kolekto 1913 (1.a jaro) Fr. 2

Abonojn oni akceptas ankaŭ ĉe ĉiuj librejoj kaj esperantaj ĵurnaloj,
kaj precipe ĉe jenaj niaj riprezentantoj:

Anglujo — British Esperanto Association, 133-136 High Holborn - London

Bohemujo — *La Marto* Haida - (Aŭstrio)

Brazilio — Ismael Gomes Braga - Teixeira (Minas)

Francujo — Esperantista Centra Librejo - 51 Rue de Clichy, Paris

Hispanujo — José Huguet, industria teknikisto - Reus

Hungarujo — Johano Kozma - Mezőzombor (Zemlem-n)

Hinujo — K. Ĉ. Šan - 200 Shantung Rd., Shanghai

Istria e Provincie Italiane dell'Austria, eccetto il Trentino - Prof. G. Cossaro -
Capodistria

Japanujo — *Orienta Azio* - Sekajgo Ŝojn, Oŝakimaĉi, Ebaragun - Tokio

Norvegujo — Bruno Rifling - Bekkelag

Svedujo — Peter Berg - Kungslena, Kavlas

Rusujo — Librejo Esperanto - 26 Tverskaja, Moskvo

Trentino — Giovanni Marchetti - Via S. Croce 3, Trento

